

PENSEO

N-ro 242

dec. / 2011

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 22-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



nigra truo

rifuĝo ne eblas
ĉe la punkto kriza.
kiam mia kapo ekleviĝas
el sub la horizonto,
min kaptas via vidokampo.
turniĝa orbito
kondukas rigardon en abismon.
revena vojo perdiĝas en arboj.
tajdoj fluktuantaj logas vermojn petolemajn.
pro kuniĝo de magneto kaj elektro
knaradas la dentradoj konkava kaj konvekca.
la montoj, valo kaj rivero
solviĝas en lafo.
fulmoj ĝemas kiel ventoj.
steloj fluas.
penstras lumoj sukaj la membranon
kaj atingas la neston senforman.
orfiŝoj vagantaj trovas ardajn hejmojn
en ovoj sangemaj.
falo el la ĉielspaco
kreas vivojn ekster plantoj.
la nokto solida
memoras nian silenton.
unu milimetro ja bezonas dek mil jarojn.
niaj voĉoj estas fridigitaj
en la kurba blanka tempo.
eltiro jam ne eblas.



gespionoj

inter la du korpoj en la sama lito
troviĝas maro malklara.
post ridoj sin kaŝas atombomboj.
eniĝo kaj eliro egaliĝas.
tago estas nokto.
haroj konfuzas harojn;
sekretaj kodoj fluas tra la fingroj.
langon pro lango,
suko venenas lakton.
fajreroj flugas sur la kapo.
glacio kolektiĝas sub la piedaro.
en tombo palaco plenas de okuloj.
kandeloj lumas stelojn ekster galaksio.
la oreloj sur la pugo legas
pluvliniojn transmonegajn.
korpturno kaŭzas cunamon.
trapasante murojn kaj tranĉilojn,
nudoj kovras la vestaĵojn.
silento muĝas en la koroj.
vortoj senliteraj skribiĝas en la haŭtojn.
por forgeso ili encerbigas neniecon.
flustrado forblovas
la oron el amoro;
la restaĵo estas ludo drogopista.
en sonĝoj planitaj, mortintoj revivas.
la geedzoj mortas ofte
en siaj ventroj arsenaleskaj.
ŝi naskas lin dum li ŝin naskigas.



Roseha (Francujo)



Ĝurjura

(liberaj versoj)

Tra la montaro krutega,
Pri la mallarĝaj vojetoj
Mi memoras.

Pri ŝafidoj petolantaj,
Kaj la gracilaj blekadoj
Vibrigantaj la aeron,
Mi memoras.

Pri la vilaĝaj ĝardenoj,
La olivarboj majestaj,
La opuntioj, mi ne forgesas.

El la terkruĉo, somere,
Ŝprucadis akvo frosteta.

Bonodoris la dometo,
Kiam avino pretigis
Kelkan pladon spicitan.

Tiom da tagoj, de tiam,
Tiom da jaroj forfluas....

Tiuj memoraĵoj staras
Nun en kelkaj belaj songoj.

Sed suno ĉiam ruĝigos
La orobrilantajn suprojn
De la kruta monto mia....

(en la memoro de mia patrino, kiu naskiĝis en
vilaĝo, proksime al tiu montaro)



Sub la sama suno

Sub la sama suno,
Oranĝoj maturiĝas,
Kaj sekiĝas sangaj flakoj...
Printempe elvolviĝas
Samaj birdoj.
Floroj elbutoniĝas
Simile la junulinoj !
Sinjoro, kia beleco !
Ve, ĉi-tiuj mirindaĵoj
Ne malhelpas la militon.
Ĉar la homoj batalas
Ĝis en la Tero Sankta.
Kiam infano falas
Sub la fajro de pafilo
Printempon oni buĉas...
Certe, bonuloj ekzistas
Amaŭflanke de la limo.
Oni mortigas tamen.
Paca kolombo falis.
Ĝiaj flugiloj ruĝiĝis.
Kial ? Ĝis kiam Sinjoro
Daŭros tiu frenezo ?
Ĝis Kiam sangaj flakoj
Sub la suno sekiĝos ?



Ŭel (Brazilo)



Elegio al grilo

De kie vi venis, verda granda grilo?
Vi venis por plaĉo.
Vi donis plaĉon.
Portis feliĉon surdorse, kaj funde suferis. Kaj,

spite al vundo, klara estis via celo montri nur
lumon. Ian lumon. Vian lumon.

Malgraŭ via probabla suferado (al vi mankis
duono de anteno, vi lamis por perdo de parto
de kruro) via aspekto, nekredible, serenis.

Por mi vi portis ian nedifineblan poeziecon.
Kaj ĝi estis tute via!


Kaj poezio por vi estis nur memplaĉi ĉe nia
korto: tie sin nutri, ĝui tempon intergrese,
kvazaŭbebe dolĉe trili por ni dumnokte, kaj
sekva-tage lasi la ejon (kaj nin!) kontraŭ la
sunon en fea aŭ feina flugado via-destinen...

Por la katoj poezio estis ludi kun vi ĉegrese
ĝislace...

Por mi, estis katastrofe atendi de vi distraĵon
por homa koro...



Leieladonna (Meksikio)



Tiu ĉi nokto

Mi povus skribi al vi
tiom da aĵoj...
estas perfekta nokto,

kaj via memoro estas tie,
freŝa...
neforviŝebla...
kaj mia menso ludas...
Mi preskaŭ povas tuŝi vin
mi preskaŭ perceptas
vian lignan aromon
aromon el viro...
tiel voluptama...
kaj vi estas...
radianta kaj belula...
la varmo estas sufoka
la nokto...
harmonia kaj bela...
momente,
kiel pro granda plaĉo
de blua nokto...
viaj lipoj ridetas,
ŝajnas tiel molaj
kaj dolĉaj,
ke oni deziras
gustumi ilin...
kiel papilio al la floro.
Kun mistera brilo...
viaj okuloj...du steloj
flamigantaj...
en viaj molaj manoj,
teneraj karesoj
kaj en via koro...
melodio de amo
kaj mia mondo ĉirkaŭas vin
en tiu momente...



Blazio VAHA (Hungaruj)



Fabeleto

Estis iam aĉa ulo,
lin tre amis aĉa ino.
Estis tre amata, same,
de l' aĉulo l' aĉa ino.
Mislaĉadis siajn ŝuojn
ĉiam tiu aĉa ulo.
Misfermadis ĉujn pordojn
ĉiam tiu aĉa ino.
Estas tute ne mirinde,
ke rezultis aĉa fino.



Paŭlo Silas (Brazilo)



ARGENTA LUNA FLUAĴO

La luna fluaĵo trakuris l' arbaron
Kaj banis eĉ ŝimajn trunketojn surgrunde.
Sed, malgraŭ ĉi tio, ricevis la malon:
Arbaran ferecan aspekton surfrunte.

Pri tio ĝi tamen sin tenis senĝene
Kaj donis la sian arĝenton al homo.
La homo esprimis senzorgon malferme
Per vortoj de ŝajna kompleta malkono.

Ho, arboj kaj homoj maldankaj de l' tero,
Pro kiu kialo vi agas tiele?
Ĉu senton de kosmo ne volas vi senti?

Do diru, ĉu devas reveni al ĉielo
Lunluma fluaĵo sendita deekstere,
Aŭ diru, al kiu mi povas ĝin sendi.

KOSMAJ LIGILOJ

Iam, la 7-an de neniam,
Ekrompiĝis la intermondaj ligiloj,
Kaŭzante neatenditajn movojn.

La tero dormis en sentima trankvilo.
Atente stasis nur la steloj ĉirkaŭantaj
L' aerajn limojn de l' planeda Homa lito.
Kometoj finis la kuradon kaj kaŭrantaj
Sub l' ombroj lunaj de l' ĝis nun kaŝita flanko
Konfide inter si babilis pri la manko
De l' forto, kiu kosmon gardus kontraŭ morto.

Saĝa kometo, la plej aĝa,
Elirigis vokon per vostaj lumbriloj
Kaj sendis al nekonataj lokoj:

*“Al kie fuĝis la protektoj ĉielaj?
Revenon nepran de ilia firma vorto
Komencu ĝuste nun, ĉar bazoj mondaj kernaj
Nuntempe tremas pro alia nova ordo.
Jam kosma parto dispeciĝis, jam ĝi falis...”*
La astro sian elvokadon jen deklaris,
Kun celo vekoj la gardantojn de l' ĉielo.

Foren vok' iris kaj enkoren
Profundiĝis neignoreblaj konsiloj.
Malhelo kosma palpebrumis rapide:
Elfore flugante venis fulmoj.
Mil feraj fulmoj traflugante tiun nulon.
Ĉevalblekado sur la ventoj tre avide,
Flugilhavajn ĉevalojn rajdis kavaliroj
Tiel, kiel malpezaj sekaj folioj.

Mondoj ĝojis pri tiu alveno,
Kvankam ili ne havis komprenon.

Kvar miloj da hufoj polvigas la senton.
Dudek mil ungoj disŝiras la tempon.
Ili ligilojn difektis ĝis fino.
La mondoj fariĝis naivaj viktimoj.



Erzsébet Tuboly (Hungarujo)



Hodiaŭa hajko

Anseroj flugas
El fora nordo sore.
Proksimas vintro.

Flugas de nordo
Grizaj sovaĝanseroj
Al suda bordo.



Guozhu (Ĉinujo)



Rimgratulo

HEA iĝas tridek-jara
meritoplana asocio
kun memorinda historio
en malfacilo multefara

rekordas eta UK rara
en la fama Esperantio
HEA iĝas tridek-jara
meritoplana asocio

fruktdona KEK elstara
pilgrimo trans Eŭ-azio
luktas per nova energio
en kunlaboro solidara

glora HEA tridek-jara!



La Tri Jubileoj

Kio gravas por la monto, ne la alto.
Kie loĝas feo, alvenas famo.
Kio gravas por la akvo, ne la profundo.
Kie loĝas drako, estiĝas mirindeco.
Okazas jen en urbo Huangshi
interesaj kaj allogaj tri jubileoj:
30-jariĝo de HEA,
152-a Zamenhof-festo,
Berila jubileo de Eĉino.
Kunsidas Esperantistaj geamikoj,
sed neniam sensciaj malkleruloj.
Ni babilas en plena entuziasmo,
vigle pri niaj altaj aspiroj.
Ĝoje kolektiĝante en Esperantujo
verdkore parolas pri la marŝo.
Guozhu diras: Ĝuinda vivo!



José Martí (1853-1895)

Guantanamera

(Kanteksto)

Mi estas homo sincera
el lando riĉa je palmoj.
Mi estas homo sincera
el lando riĉa je palmoj.
Ĉar estas mi efemera,
el mia kor' fontas kantoj.

Guantanamera, guajira guantanamera,
Guantanamera, guajira guantanamera.

Jen miaj versoj helverdas,
jen ili arde brulruĝas,

Jen miaj versoj helverdas,
jen ili arde brulruĝas,
kaj, kiel cervo vundita,
arbare ili rifuĝas.

Guantanamera, guajira guantanamera,
Guantanamera, guajira guantanamera.

Mi kundividos la sorton
kun la mizera homaro,
Mi kundividos la sorton
kun la mizera homaro,
ĉar ajna roĵo de monto
ĝojigas min pli ol maro.

Guantanamera, guajira guantanamera,
Guantanamera, guajira guantanamera.

Tradukis



Svena Dun (Hispanujo)

Henriko Heine (1797-1856)

Junulo amis inon

Junulo amis inon,
nur volis alian ja ŝi.
Sed tiu amis alian
kaj iĝis edz' pro pasi'.

La dam' pro ĉagren' edziniĝis
al iu ajn plua vir'
kurinta unue vojen.
Suferos li pro l' dezir'.

Jen tute malnova rakonto,
sed nova ĝis ĉi hor'.
Al kiu ĝi okazas,
rompiĝos plu la kor'.

tradukis



Cezar (Germanujo)

Ewa Lipska (1945-)

“Ewa Lipska (...) estas konsiderata antaŭ ĉio la poeto de paradokso, absurda ironio, aŭtoironio; ĉi difinoj diras al ni (...) ke Ewa Lipska traktas la mondon kun distanco”

Marta Wyka

Pardonu tion al mi

Ne respondas mi je viaj leteroj, telefonoj,
postlasas l' amikecojn.

Pardonu tion al mi...

Pli kaj pli mi ligas min al mi.
Retropaŝas mi funden.

Ne mirigas min popol',
Ne mirigas hom-amas'.

Venkov kaj malvenkov iĝas la samo.
Gajnoj kaj perdoj iĝas la samo.

Sur erikejoj min ravas papili'.
Dumnokte mi nutras vespertojn.

El la pinto de l' monto
mi observas
subirantan ostron de l' sun'.

Pardonu tion al mi...

Esperantigis



Helena Tylipska (Italujo)

Alfred de MUSSET (1810-1857)

Pala vespera stel'

Pala vespera stel', fora alvenanto,
Kies frunt' leviĝas de l' vespera vual',
El palac' ĉiela do pro kia kial'

Vi pririgardas sur kampo ?

Foriĝas ventego, kvietiĝis la aer',
Tremanta l'arbaro sur eriko ploras,
Falen' orflugila flirtafluge traas
En bonodoraj la herbej'.
Vi kion serĉas super dormanta ter'?

Sed jam al montoj for jen vi malleviĝas,
Vi ridete fuĝas, amikin' trista plej,
Via rigard' trema baldaŭ forviŝiĝos.

Stelo subiranta ĉe verda monteto,
Malgaja brodita larmo sur nokta sin' !
Kiun fiksrigardas iranta paŝtisto
Dum popaŝe l'vico de gregar' sekvas lin.

Ho stel' kien iras, en nokton senliman ?
Ĉu serĉas vi sur bord' en kanoj al kuŝej' ?
Kien iras bela, la horon silentan,
Fali kiel perlo en fundon de akvejoj ?

Ha ! se via kapo, belo, se vi mortu
Mergos la hararon en vasta la maro,
Antaŭ ol lasi nin nur momenton haltu!
Ne disas de ĉiel', stelo de la amo!
Esperantigis



Roland Platteau (Francujo)

Ĉineske

Lily (Ĉinujo)

Sopire al tiu momento

—laŭ ĉineska skemo Yulinling*
Tiu moment'
min gajigis
per granda tent'.
Sur vila tapiŝo

ambaŭ nudaj
oh, sen prudent'
tordiĝis freneze
kun pasia sent'
ĝemkrie
kver-murmure
en voluptema ferment'.

Li sur mi kun ĝoj-kontent'
lang-mordis
kun mana frekvent'
al mia suba tru'.
Kolapse
kun suk-torent'
mi obeis
fine.
Ĝis orgia prezent'
mi sciis,
ke eniras
min lia serpent'.

**Yulinling (tintado en pluvo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 4,44,644,65,347 / 7,35, 634, 426,345 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa, xxa, xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x = senrima)*

Eto (Ĉinujo)

Hundvosto

—laŭ ĉineska skemo Dianjiangchun*
sur la kampo
hundvosto vibras en sku'
en venta bru'
kun vivĝoja ĝu'

eta herbo
sen ajna enu'
jen viglas
kaj vivas nu
spite al frostflu'

**Dianjiangchun (ruĝigitaj lipoj): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de 47,4,5 / 45,34,5 silaboj,*

laŭ rimaranĝo *xa,a,a / xa,xa,a (x=senrima)*

Cindy Mckee (Usono)



Teroro

—laŭ ĉineska skemo Santaici*
Ni meritas morti -
kelkaj pli meritas.
Mortperantoj perdas
korpon, ĉu spiritas?

Solvu la spiriton
Dio, se Vi estas,
do murdemon ili
jam ne manifestas.

**Santaici (tri terasoj): ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de ses silaboj kun krucrimo.*

Yanke (Ĉinujo)

Monologo de herbo

—laŭ ĉineska skemo Chaozhongcuo*
ne alloga kiel flor’
nek kun bonodor’
mi ja vivas simple
nur en suna lumglor’

mi nur havas
la deziron
per verd-kolor’
ornami l’ printempon
kun tempo kiel or’

**Chaozhongcuo (pedanta klerulo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de 7,5,66 / 444,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xxa,xa (x=senrima).*



Vejdo (Ĉinujo)



Al Ŭel, mia brazila amiko

okaze de lia naskiĝtago 2011

—laŭ ĉineska skemo Nanxiangzi*
kara frato Ŭel
kun verdakora fidel’
pene faras versojn de
juvel’
jen per Esperanta bel’

l’ agema Abel’
diligentas sen anhel’
en parnasa ĝarden’ de
fabel’
por nutroriĉa miel’

**Nanxiangzi (sudlandano): Ĉina fiksfirma poemo el du samaj strofoj kun po kvin versoj de 5,7,72,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a (x=senrima)*

Sero (Ĉinujo)

Skizo pri stepo

—laŭ ĉineska skemo Genglouzi*
blanko sub
lazuro
ondas kun plezuro
sur tapiŝ’
la verda
sen mov’ inerta

la flava
koloro
kiel brila oro
punktitas
kvieta
dolĉe ridete

**Genglouzi (kanto de akva horloĝo en nokto): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po ses*

versoj de 33,6;33,5; / 33,6;33,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xaa,xbb / xcc,xdd (x=senrima)

Konvulvulo

—laŭ ĉineska skemo Heyebei*

ĝi kun koketa bel'
sen cel'
rampas jen
alien jen tien ĉi
ha, ĝi
ja sen ĝen'

kun bunta funelflor'
ĝi por
fanfaron'
trumpetas plenespere
vere
per vant-ton'

*Heyebei (lotusflora taso): ĉina fiksfirma poemo el 6 versoj de 6,2:3;7,2:3 silaboj, laŭ rimaranĝo aab,ccb

Maupassant (1850-1893)



(II)

Malgraŭ la pluvado, oni lasis la fenestron malfermitan ; kaj iafoje unu el ili iris al ĝi kaj aŭskultis. Je la deka post la sesa, la barono signalis malproksiman rulbruon. Ĉiuj sin pelis ; kaj baldaŭ la veturilego alvenis, ĝiaj kvar ĉevaloj ĉiam galopante, kotkovritaj ĝis la dorso, ŝvitegantaj kaj spiregantaj.

Kaj kvin virinoj elveturiĝis kaj rapidis al la perono, kvin belaj knabinoj zorge elektitaj de kamarado de la kapitano, al kiu La Devo estis alportinta vizitkarton de sia oficiro.

Ili tute ne malbonvole akceptis, certaj esti bone pagitaj, ĉar cetere ili konis la Prusojn, de antaŭ jam tri monatoj, ke ili frekventis tiujn militistojn, kaj resignacianta pri la viroj kiel la

aĵoj . « Estas la metio, kiu volas tion » ili sin diris survoje, por sendube respondi al ia sekreta piketado de restaĵo de konscienco.

Kaj tuj oni eniris en la iluminatan manĝoĉambron. Ĝi ŝajnis ankoraŭ pli veaspekta pro ĝia hontinda ruinigo ; kaj la tablo kovrita per viandoj, per riĉa teleraro kaj la arĝentaĵaro retrovita en la muro, kie la proprietulo kaŝis ĝin, aspektigis tiun lokon kiel tavernon por banditoj, kiuj vespermanĝas post rabado. La kapitano, ĝojradia, proprigis al si la virinojn kiel familiarian aĵon, aprezante ilin, kisante ilin, flaresplorante ilin, taksante ilin laŭ ilia valoro kiel voluptaj knabinoj ; kaj ĉar la tri junuloj volis ĉiu preni unu ; li aŭtoritate oponis al tio, postulante fari si mem la partigon, plenjuste, laŭ la gradoj, por tute ne ofendi la hierarkion.

Tiam, por eviti ĉian diskutadon, ĉian kontestadon, kaj ĉian partiecan suspekton, li vicigis ilin laŭ ilia statur, kaj alparolante la plej grandan, kun komanda tono : « Kio estas via nomo ? »

Fortigante sian voĉon, ŝi respondis : « Pamela. »

Tiam li proklamis : « Unua numero, la nomata Pamela, adjudikita al la majoro. »

Poste, kisinte Blondina-n, la duan, en signo de proprieto, li donacis al la leŭtenanto Oto la dikan Amanda-n, Eva-n la Tomato al la sub-leŭtenanto Frederiko, kaj la plej malgrandajn el ĉiuj, Raĥel, brunan tute junan, kun la okuloj nigraj kiel inkomakulo, judinon kies kuspa nazo konfirmis la regulon, kiu faras kurbajn bekojn al ŝia tuta raso, al la plej juna el la oficiroj, al la fragilaspekta markizo Vilhemo de Erik.

Cetere, ĉiuj estis beletaj kaj grasaj, sen ja distingeblaj fizionomioj, faritaj proksimume simile pri la aspekto kaj la haŭto, pro la ĉiutagaj amopratikoj, kaj la komuna vivo en la ĉiesulinejoj.

La tri junuloj pretendis tuj kuntiri siajn virinojn, je preteksto de proponi al ili brosojn

kaj sapon, por ke ili purigu sin ; sed la kapitano saĝe oponiis al tio, jesante ke ili estis sufiĉe puraj por altabliĝi, kaj tiuj kiuj suprenirus, malsuprenirante volus ŝanĝi virinojn, ĝenante tiamaniere la aliajn parojn. Lia eksperimento superis. Okazis nur multaj kisoj, kisoj de atendado.

Subite, Raĥel sufokis, tusante ĝis la larmoj, kaj eligante fumon per la naztruoj. La markizo, pretekste ke li volu kisi ŝin, ĵus blovis fumoĵeton el tabako en ŝian buŝon. Ŝi tute ne koleriĝis kontraŭ li, ne diris vorton, sed ŝi fikse rigardis sian posedanton, kun funde de siaj nigraj okuloj vekiganta kolero.

Oni sidiĝis. La komandanto mem ŝajnis kontentega ; dekstre li lokis Pamela-n, maldekstre Blondina-n, kaj malfaldante sian buŝtukon, li deklaris : « Kian ĉarman ideon, vi ĵus havis, kapitano. »

La leŭtenantoj Oto kaj Frederiko, ĝentilaj kiel se ili estus kun mondumaninoj, iom senmemfidigis siajn najbarinojn ; sed la barono de Kelveingstein, allasata sin al malvirto, radiis, eligis malprudajn vortojn, ŝajnis brula kun sia krono el ruĝaj haroj. Li galantigis per franca de Rejno ; kaj liaj tavernaj komplimentoj, ekspektorataj tra la truo de la du rompitaĵoj, alvenis al la knabinoj meze de salivmitralado.

Cetere, ili nenion komprenis ; kaj ilia intelekto ŝajnis nur vekigi, kiam li kraĉis obscenajn parolojn, krudajn esprimojn, kripligitajn pro sia akcento. Tiam, ĉiuj kune, ili ekridegis kiel frenezulinoj, falante sur la ventron de siaj najbaroj, ripetante la vortojn, kiujn tiam la barono plezure misproncis, por diri al tiuj ĉi obscenaĵojn, kiujn ili laŭplace sputis, ebriiĝintaj ekde la unuaj vinboteloj ; kaj refariĝante si mem, la kutimo superis, ili kisis la lipharojn de ambaŭ flankoj, pinĉis la brakojn, eligis furiozajn kriojn, trinkis en ĉiuj glasoj, kantis francajn strofojn, kaj germanajn kanzonopecojn, kiujn ili lernis dum siaj ĉiutagaj rilatoj kun la malamiko.

Baldaŭ la viroj mem, ebriiĝantaj pro tiu virina karno dise prezentataj sub sia nazo, kaj sub ŝiaj manoj, freneziĝis, hurlante, rompante la teleraron, dum malantaŭ sia dorso, neŝanceleblaj soldatoj daŭrigis servi ilin.

Nur la majoro konservis sinmoderigon.

F-ino Fifi prenis la judinon Raĥel sur siaj genuoj, kaj ekscitiĝante mem, jen li freneze kisis la ebonajn harbukletojn de ŝia kolo, flarante tra la maldika interspaco, inter la robo kaj la haŭto, la mildan varmon de ŝia korpo, kaj la tutan odoron de ŝia persono ; jen, tra la ŝtofo, li furioze pinĉis ŝin, farante krii ŝin, ekkaptata de rabiema kruelegeco, turmentata de sia bezono de detruego. Ofte ankaŭ, tenante ŝin plenbrake, ĉirkaŭpremante ŝin, kvazaŭ li volus sin miksi al ŝi, li longe apogis siajn lipojn sur la freŝa buŝo de la judino, senspirige kisis ŝin ; sed subite li mordis ŝin tiel profunde, ke trenaĵo el sango malsupreniris sur la mentono de la juna virino, kaj fluis en ŝian korsaĵon.

Denove, ŝi alfrontis lian rigardon, kaj lavante la vundon, ŝi murmuris : « Tion vi repagos al mi. » Li ekridis, per malmolkora rido. « Mi pagos », li diris.

Oni alvenis al la deserto ; oni verŝis ĉampanon. La majoro stariĝis, kaj per la sama tono, ke se li proponus toston al la sano de la imperiestrino Aŭgusta, li trinkis :

« Je niaj sinjorinoj ! » Kaj serio de tosto komencis ; tosto de galanteco de soldataĉoj kaj drinkuloj, miksataj de obscenaj ŝercoj, kiuj estis ankoraŭ pli krudaj pro la nesciado de la lingvo.

La oficiroj leviĝis unu post la alia, serĉante spriti, strebante ŝerci ; kaj la virinoj, ebriaj ĝis fali, kun la okuloj svagaj, la lipoj ŝlimaj, ĉiufoje freneze plaŭdis.

La kapitano, volante sendube doni al la orgio galantan mienon, levis ankoraŭ unufoje sian glason, kaj proncis : « Je niaj venkoj sur la koroj ! »

Tiam la leŭtenanto Oto, iu speco de urso de la Nigra Arbaro, stariĝis, arda, saturita de trinkaĵoj. Kaj subite invadita de alkohola patriotismo, li kriis : « Je niaj venkoj kontraŭ Francio ! »

Kvankam ili estis komplete ebriaj, la virinoj silentis ; kaj Raĥel, tremetanta, sin returnis : « Vi scias, mi konas Francojn, antaŭ kiuj vi ne dirus tion. »

Sed la malgranda markizo, kiu ĉiam tenis ŝin sur siaj genuoj, ekridis, fariĝinta gajega pro vino : « Ha ! ha ! ha ! unu neniam mi eĉ vidis. Tuj kiam ni aperas, ili forkuregas ! »

La knabino, furiozigit, kriis al lia vizaĝo : « Vi mensogas, fiulo ! »

Dum momenteto, li fiksis siajn helajn okulojn sur ŝin, same kiel li fiksis ilin sur la pentraĵojn, kies li krevis la pentrotolon per revolverpafoj, kaj poste denove li ekridis : « Ha ! jes, ni parolu pri tio, la belulino ! ĉu ni estus ĉi tie, se ili estus bravaj ? » Kaj li vigliĝis : « Ni estas iliaj mastroj ! Al ni Francio ! »

Per skuo, ŝi deiris liajn genuojn, kaj falis sur sian seĝon. Li stariĝis, aletendis sian glason ĝis meze de la tablo, kaj ripetis : « Al ni Francio, kaj la Francoj, la arbaroj, la kampoj kaj la francaj domoj ! »

La aliaj, komplete ebriegaj, subite skuataj de milita entuziasmo, iu entuziasmo de brutuloj, ekkaptis siajn glasojn kolere kriante : « Vivu Prusio ! », kaj trinkis ilin per unu nura gluto.

La knabinoj tute ne protestis, devigitaj al la silento, kaj ekkaptataj de timo. Raĥel mem silentis, senpotenca por respondi.

Tiam, la malgranda markizo metis sur la kapon de la judino sian kalikon denove plenigitan per ĉampano : « Al ni ankaŭ, li kriis, ĉiuj virinoj de Francio ! »

Ŝi stariĝis tiel rapide, ke la glaso el kristalo, plenigita de flava vino, renversigita, malpleniĝis kiel por bapto, sur ŝiajn nigrajn harojn, kaj ĝi falis, rompiĝante surplanke. La

lipoj tremantaj, ŝi spitis la oficiron per la rigardo, kiu ĉiam ridadis, kaj ŝi balbutis, per gorĝpremata voĉo pro la kolero : « Tio... tio... tio ne estas vera, ne kredinde, vi ne havos la virinojn de Francio. »

Li sidiĝis, por pli komforte ridi, kaj serĉante la Parizan akcenton : « Si estas bonege, bonege, tiam kion vi faras ĉi tie, etulino ? »

Tute konfuzita, unue ŝi silentis, malbone komprenante pro sia tumulto, poste tuj kiam ŝi bone kaptis la signifon kion li diris, indigna kaj impetega, ŝi ĵetis al li : « Mi ! mi ! Mi ne estas virino, mi estas putino ; tio estas ja ĉio, tio kio necesas al Prusoj. »

Ŝi apenaŭ finis, ke li fortege vangofrapis ŝin ; sed dum li levis ankoraŭ unufoje la manon, hunde rabiata, ŝi ekkaptis sur la tablo malgrandan desertotranĉilon kun klingo el arĝento, kaj tiom abrupte, ke unue nenion oni vidis, ŝi rekte pikis ĝin en lian kolon, ekzakte en la kavo kie la brusto komencas.

Vorto kiun li prononcis estis blokita en lia gorĝo ; kaj li restis faŭkanta, kun timiga rigardo.

Ĉiuj eligis leonblekon, kaj impetege stariĝis ; sed ĉar ŝi ĵetis sian seĝon en la krurojn de la leŭtenanto Oto, kiu falegis laŭ sia tuta longeco, ŝi kuris al la fenestro, malfermis ĝin, kaj antaŭ ke oni povu atingi ŝin, ŝi enprofundiĝis en la nokton, sub la pluvo, kiu ĉiam falis.

En du minutoj, F-ino Fifi mortis. Tiam Frederiko kaj Oto elingigis, kaj volis masakri la virinojn, kiuj sin ĵetis ĉe iliaj genuoj. La majoro, ne senpene, malebligis tiun buŝadon, enfermigis en dormoĉambro la kvar konfuzegatajn knabinojn, kiujn li gardigis per du soldatoj ; poste, kvazaŭ li lokus siajn soldatojn por batalo, li organizis la postkuradon de la fuĝantino, ja certa kapti ŝin.

Kvindek viroj, vipitaj de minacoj, estis sturmigitaj en la parkon. Du cent aliaj

